

nuna nombro kaj formo nur tiel, kiel kaj kiom longe ili estas utilaj por la homo. La celo de bestobredado ne estas bestoama, ankaŭ ne bestoamika. La besto estas flegata kaj nutrata por esti prirabata, senfeligata kaj manĝata.

Bestoprotektado estas tute relativa afero: fine ja la homo "protektas" siajn predojn tiom multe – aŭ tiom malmulte – kiom tion faras ĉiu alia rabobestospeseco: nome li protektas ilin por si mem kontraŭ aliuloj. La demando restas nur, kiom severe li ilin traktas antaŭ ol buĉi ilin. Ni ne preteratentu la avantaĝojn kaj plibonigojn rilate al la transporta zorgo kaj vartado de buĉbovoj, la kaŝotenado de ovoproduktaj kokinoj kaj aliaj industriaj bestotenad-teĥnikoj. Ni ankaŭ ne forgesu aliajn ekologiajn ekkonojn, kiuj intertempe politike venkis spacon.

Sed ni ne rigardu kaj akceptu tiajn plibonigojn kiel favoraĵojn de la flanko de la leĝodonaj ministerioj aŭ gvidaj registaroj. La politika kaj industria opinio ofte malsamas kun tio, kion rimarkas la observema naturprotektanto.

Ŝajne agas kelkfoje kvietiga aparato de politikaj instancoj kontraŭ plendoj de bestoprotektantoj. Estas tempo evoluigi pli bonan komprenon inter ofte nepacigeblaj kaj senkompromisaj frontoj. Ni serĉu veran kaj sinceran vojon cele al ambaŭflanka interkonsento pri konscia bestoprotektado.

La bestoj estas parto de nia Tero, same vundigeblaj kiel la grundo. La homo ne estas mastro de ĉio kio vivas – li same estas parto de la Tero.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Rüdiger SACHS
Vor dem Brückentor 3
DE – 37269 Eschwege
Germanio

<IsaeSachs@aol.com>

Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas bestkuracisto kaj profesoriĝis en parazitologio. Li multajn jarojn laboris en Afriko kaj speciale okupiĝis pri protektado de sovaĝaj bestoj en tropiklandaj Naciaj Parkoj.

Ĉu la realista starpunkto ekzistis ekde la komenco en la genera gramatiko de *Chomsky*?

Hiroshi NAGATA

Resumo

Chomsky (1975) asertis, ke en LSLT (*The logical structure of linguistic theory*, t.e. la logika strukturo de lingvistika teorio) la realista starpunkto estas plene kaj senkondiĉe akceptita. Tiu ĉi artikolo ĵetis dubon antaŭ lia aserto, esplorante tiun ĉi verkon kaj aliajn publikigitajn en plej fruaj jaroj. Ĝi konkludis, ke en la verko ne ekzistis la realista starpunkto aŭtentika aŭ mensa aŭ fizika, sed ekzistis anstataŭe nur kvazaŭa mensa realismo en la formo de lingva intuicio. Tiu ĉi lingva intuicio ne estis identa kun iuj aŭ aliaj aspektoj de la teorio, sekve, kontraŭe al lia aserto, nesufiĉa por kontentigi aŭtentikan realismon.

Enkonduko

La genera gramatiko de *Chomsky* ("Ĉomsko" en la sekva teksto konforme al Esperanta ortografio, escepte dum referencado) disvolviĝis tiugrade, ke oni karakterizas ĝin kadre de biolingvistiko (angle *biolinguistics*, ekz. *Jenkins* 2000; *Anderson & Lightfoot* 2002) ⁽¹⁾ kaj ke "la studo de biologie necesaj trajtoj de lingvo konsistigas parton de natura scienco" (*Chomsky* 1980, p. 29).⁽²⁾ Ĉomsko, laŭ *Jenkins* (2002, p. 3), mem priskribis en 1968 lingvistikon kiel "teorian biologion." Ne necesas diri, ke tiuj ĉi esploristoj, inkluzive de Ĉomsko, ne esploras la biologiajn aspektojn de lingvo, sed nur ties strukturajn aspektojn pere de formalismaj analizoj. Tial oni neniel povas trovi en iliaj studoj iom da eroj, kiuj sugestas tian biologion kian eĉ nefakuloj unuavide ekvidas en biologiaj verkoj. Ili tamen insistas, ke iliaj analizoj traktas ne abstraktajn teoriajn konstruojn (angle, *theoretical constructs*) sed ĝuste realajn objektojn (vd. *Chomsky* 1983, 1987). Laŭ tiu ĉi realista starpunkto, ilia lingva teorio formalisma rilate, ekzemple, al universala gramatiko efektive indikas ne nur realajn statojn de

lingvosocio akirita kaj posedata de lingvoparolantoj, sed ankaŭ ties fizike realajn kontraŭpartojn. Chomsky (1975) asertis en la antaŭparolo al LSLT (*The logical structure of linguistic theory*, t.e. "La logika strukturo de lingvistika teorio"), ke "[e]n LSLT, la 'realista' starpunkto estas plene kaj senkondiĉe akceptita" (p. 37).⁽³⁾ LSLT estas manuskripto, kiun Ĉomsko skribis en 1955 kiel la unuan provon ellabori lingvistikan teorion precize formulitan kaj koncepte plenan surbaze de nocioj plejeble klaraj.⁽⁴⁾ Ĉomsko do asertas, ke jam ekde la komenco li alprenis en LSLT la realismon pri sia lingva teorio.

Tiu ĉi artikolo ĵetas dubon antaŭ tiu aserto, esplorante artikolojn skribitajn de Ĉomsko en la plej frua fazo de lia kariero kaj montrante diferencojn, kiuj ekzistas inter la realismo intencita en la postaj jaroj kaj la realismo efektive estinta en tiu fazo.

Duobla signifo de realista starpunkto

Antaŭ ol eniri en konsideron de la Ĉomska aserto, ni devas distingi du signifojn entenatajn de la koncepto realista, por ne erare kompreni kion Ĉomsko intencis per tiu ĉi koncepto. Unu koncepto koncernas realismon mensan, t.e. psiĥologian, dum alia koncernas realismon fizikan. La unua estas la signifo kiun Ĉomsko intencas per mensa realeco, karakterizante lingvistikon kiel "psiĥologion pri sciado (angle *cognitive psychology*)" (Chomsky 1968, p. 1). La dua koncernas la signifon kiun Ĉomsko celas aŭ per "definitiva realmonda objekto (angle *a definite real-world object*)" (Chomsky 1983, p. 156) aŭ per "reala objekto (angle *real object*)" (Chomsky 1983, p. 158) aŭ per "reala objekto en la fizika mondo (angle *a real object in the physical world*)" (Chomsky 1987, p. 37). Ekzistas, tamen, granda diferenco inter la du signifoj. La lasta signifo kiel reala objekto implicas, ke objektivaj fizikaj objektoj reale ekzistas korelativaj al iuj aŭ aliaj aspektoj de lia lingva teorio, dum la unua signifo kiel mensa realeco ne implicas la ekziston de tiaj fizikaj korelativoj sed nur la ekziston de mensaj korelativoj. La mensa realismo nur antaŭsupozas, ke la mensa realeco estas teorie postulata sammaniere kiel teoriaj konstruoj, kiuj estas postulataj en psiĥologiaj teorioj. Sekve la lingva teorio kiel la psiĥologia mensa realeco neniam implicas ties fizikan substancon, kontraŭe al la signifo de la lingva teorio kiel reala objekto fizika.

Staras nun la demando: kiun el la du realismoj Ĉomsko intencis en LSLT?

Ĉu la Ĉomska teorio tiutempa koncernas naturan objekton?

La Ĉomska teorio koncernas la homan lingvokapablon (angle *human language faculty*) kaj la Internigitan Lingvon (I-lingvo; angle *I-language*), t.e. sinmontriĝon de la lingvokapablo. Li asertas, ke la lingvokapablo kaj la I-lingvo(j) kvalifikiĝas kiel naturaj objektoj en la sama senco, kiel molekuloj estas naturaj objektoj (Chomsky 2000, p. 106, p. 119). Notu, tamen, ke naturaj objektoj, kiel Nakaya (1958) klare skribas, estas tiuj, kiuj posedas mason fizike identigeblan kaj fizike difineblan. Apliku tiun ĉi difinon de natura objekto al la supraj du konceptoj, la lingvokapablo kaj la I-lingvo(j). Tiam tuj klariĝas, ke la du konceptoj neniel kvalifikiĝas kiel naturaj objektoj, ĉar ili posedas neniom da maso. La du konceptoj koncernas procezojn, kiuj rezultas pere de funkciado de cerbo-mehanismo ankoraŭ ne sufiĉe precizigita. Ne validas sekve la Ĉomska egaligo de la lingvokapablo kaj la I-lingvo(j) kun naturaj objektoj. Tiaj ĉi konceptoj ne posedas fizikan materion, kontraŭe al la Ĉomska aserto (ekz. Chomsky 1983, 1987).

Konsideru, ekzemple, la studon de Baker (2001), kiu celis identigi unu el la Ĉomskaj konceptoj kun reala objekto. Li provis klasifiki diverstipajn lingvojn laŭ la hierarĥia aplikado de parametroj surbaze de la firma konfido, ke "parametroj povas plenumi la saman rolon fundamentan en sciencaj teorioj de lingva diverseco, kiun rolas atomoj en ĥemio" (p.ix). Parametro estas dimensio de gramatika variado inter diversaj malsamaj lingvoj kaj la sinsekvo de fiksado de iuj aŭ aliaj parametroj karakterizas la sintaksan trajton de iu aŭ alia lingvo. Baker do identigas la parametrojn kun atomoj, kvankam la lastaj estas fizikaj objektoj dum la unuaj ne estas. Plue, antaŭ ĉio, la teorado por postuli la koncepton de parametro entenas en si fundamentan malfacilecon, kiel ni indikis aliloke (Nagata 2007). Atomoj estas fizikaj materioj kaj tial posedas mason, dum parametroj estas teoriaj konstruoj kaj tial ne posedas mason. Tiu-rilate, lia provo identigi parametrojn kun atomoj ne estas ĝusta.

Sekve, la asertoj, kiujn prezentas Ĉomsko kaj liaj sekvantoj, estas erarigaj. Naturaj objektoj estas fizikaj materioj kiuj subtenas la lingvajn fenomenojn. Tiuj ĉi fenomenoj, tial, mem ne estas identaj kun naturaj objektoj. Tiu-rilate, ni devas diri, ke LSLT ne entenas en si menciojn pri fizika realismo.

Ĉu la Ĉomska teorio koncernas psiĥologian realecon?

Esti realista en la psiĥologia senco antaŭsupozas, ke iuj aŭ aliaj psiĥologiaj kontraŭpartoj mense ekzistas rilate al tiuj, kiujn Ĉomsko utiligas en sia lingva teorio, sendepende de tio, ke la psiĥologiaj kontraŭpartoj estas tiuj aŭ de reguloj gramatikaj aŭ de universala gramatiko aŭ de aliaj teoriaj konstruoj. Tio ĉi implicas, ke psiĥologia realismo antaŭsupozas mensismon, kiu akceptas la ekziston de mensaj teoriaj konstruoj.

La fakton, ke Ĉomsko rifuzis la mensismon almenaŭ ĝis ĉirkaŭ la mezo de 1950-aj jaroj, montris plej klare *Steinberg* (1975, 1976), kaj ankaŭ *Katz* (1981) kaj *Itkonen* (1996) alimaniere. Sekve, *Chomsky* (1955a) rifuzis mensismajn konceptojn, kiel "ideoj (angle *ideas*)" kaj "signifoj (angle *meanings*)", kiel terminojn ne taŭgajn por lingvistiko, same kiel fantomoj ne estas "adekvataj konceptoj por fiziko" (p. 1-20), forĵetante do mensismon pro "ties obskureco kaj ĝenerala senutileco en lingvistika teorio" (p. 1-20). Li subtenis, tute kontraŭe al sia starpunkto en la postaj jaroj, du esploristojn: *Bloomfield* kaj *Quine*, ambaŭ antimensistojn. Notu, ke lia rifuzo de mensismo estis tiom forta, ke "enkonduko de dispozicioj (aŭ mensaj terminoj) estas aŭ senrilata aŭ trivialigas la teorion" (p. 1-21). Ĉomsko tiutempe celis anstataŭe konstrui la ĝeneralan teorion de lingvistika strukturo nur sole utiligante sistemon de difinoj kaj ties ĝeneralaj trajtoj kaj specifaj interrilatoj. Por tion ĉi plenumi, mensismaj terminoj estis por li tute konfuzaj kaj neekonomiaj.

Tiurilate, en la Ĉomska tiutempa lingva teorio ne ekzistis spaco por enigi en sin mem iom da mensismo, sekve implicite, iom da realismo eĉ psiĥologia. Tiun ĉi interpreton povas subteni liaj publikigaĵoj plej fruaj (ekz. *Chomsky* 1953, 1955b), kiuj ne menciis mensismajn aspektojn de lia lingva teorio. Tiuj ĉi, ankoraŭfoje, celis starigi formaligitan teorion de lingva strukturo senrilate al logiko kaj semantiko⁽⁵⁾.

Sekve ne povas kunekzisti samtempe du starpunktoj, kiuj staras unu kontraŭ la alia. La starpunkto, kiu rifuzas mensisman realecon, neniel staras konforme al la starpunkto, kiu asertas ĝin. Kial do *Chomsky* (1975) asertis, ke en LSLT la realista starpunkto estis plene kaj senkondiĉe akceptita? Kiun aspekton de sia lingva teorio li intencis per la realista starpunkto?

Mensaj aspektoj implicitaj en la Ĉomska tiutempa teorio

LSLT principe ne akceptis mensisman realecon. Tamen, se ni elprovas trovi tie mensistan aspekton, ekaperas tia aspekto, kiu sugestas ion kvazaŭ mensistan, kvankam ĝi ne rekte indikas, ke Ĉomsko asertis la ekziston de mensa korelativo rilate al tiu aspekto de sia teorio. Tiu ĉi mensista aspekto aperis en la formo de intuicio. Tiu ĉi koncepto plenumas rolon tiom esencan, ke li eldiris, ke "[i]ntuicio estas precize tio, kion, laŭ mia opinio, mi skribis. La empiria datumo, kion mi volas klarigi, estas la intuicio de denaskaj parolantoj" (*Chomsky* 1962, p. 158) kaj ke "mi (Ĉomsko) povas esperi eltrovi, en mia gramatiko, klarigon pri la intuicio de parolantoj" (*Chomsky*, 1962, p. 158, krampoj aldonitaj).⁽⁶⁾ En tiaj eldiroj Ĉomsko asertis, ke lia lingva teorio estas nenio alia ol la priskribo de la lingva intuicio posedata de denaskaj parolantoj. Tiu ĉi nocio, ni ne forgesu, restas senŝanĝe ĝis la nuna tempo. Kaj eĉ en LSLT ni fakte povas renkonti multfojjajn menciojn pri la intuicio.

Notende, tamen, estas antaŭ ĉio, ke en la Ĉomska teorio intuicio enhavas duoblan signifon.⁽⁷⁾ Unuflanke, ĝi koncernas celobjekton al kies specifado li direktas sian esploron. Tiu ĉi flanko aperas en LSLT, kiam li skribas: "[n]ia celo estas konstrui simplan gramatikon, kiu klarigas kaj apogas la lingvan intuicion de la denaska parolanto" (*Chomsky* 1955a, 1-53). Aliflanke, intuicio koncernas lingvan provizon, per kiu li pritaksas, ĉu iu aparta teorio estas pravigebla, aŭ per kiu parolantoj decidas, ĉu iu aŭ alia lingva elemento estas akceptebla. Ankaŭ tiu ĉi flanko aperas en LSLT, kiel videblas, ekzemple, rilate al lingvistoj: "la eltrovo de formalaj markiloj mistrافیĝas tiugrade, kiom ni zorgas ne utiligi intuicion kiam ni konstruas aŭ validigas gramatikojn" (*Chomsky* 1955a, 1-17) kaj rilate al ordinara parolantoj: "[k]iel ni povas priskribi tiun ĉi kapablon distingi la gramatikecon de frazoj? Nur solan fakton ni povas tuj mencii. Tio estas, ke la parolantoj posedas intuician senton de gramatikeco." (*Chomsky* 1955a, 1-39). Tiuj ĉi du flankoj de intuicio ŝajnas ne klare konsciita de Ĉomsko. Tamen, neneigeble estas, ke tiuj du signifoj ekzistas en la Ĉomska uzado de tiu ĉi koncepto.

La intuicio tiamaniere karakterizita entenas certe mensistan aspekton. Se Ĉomsko en LSLT estis intencinta per la koncepto realista ion kiel ĉi tian, ni povus akcepti lian aserton. Kaj, fakte, tion ĉi Ĉomsko trafe intencis per la realista starpunkto. *Chomsky* (1975) do skribis tuj

post la mencio pri la realista starpunkto traktata en tiu ĉi artikolo, ke "gramatiko determinita de lingva teorio formas hipotezon pri la lingvoscio posedata de parolanto-aŭdanto kaj ĝi povas esti konfirmebla aŭ malkonfirmebla surbaze de empiriaj evidentajoj, kiuj estas eltiritaj el, plej laste, esplorado de la lingvaj intuicioj de la lingvo-uzantoj" (p. 37). Tamen ĉi tie la, ŝajne iom specifita, karakterizado aŭ de la lingva intuicio aŭ de la lingvoscio en la 1975-a versio ankoraŭ ne tiom klare eltroveblas en la 1955-a versio. Sekve ne prava estas lia uzado de la vorto *realista* en la 1975-a versio. Krome, eĉ la 1975-a karakterizado ne sufiĉas, se oni metas ĝin kontraŭ la aŭtentika senco de la vorto. Tio ĉi estas primare pro tio, ke la intuicio kaj la lingvoscio estas nesufiĉe specifitaj por kvalifikiĝi kiel mensaj konstruoj konformaj al specifaj aspektoj de lia teorio. Sekve ni devas diri, ke multe mankas por ke ili staru kiel "mensa realeco" (Chomsky 1965, p. 4).

Kiam do aperis mensisma kaj fizika starpunktoj?

Sekvas do, ke en LSLT Ĉomsko ne intencis fizikan materion per sia lingva teorio. Nek konfirme li konsciis, ke la lingva teorio estas precize tio, kion mense posedas lingvoparolantoj. Neclare levigis ĉe li la konscio pri la interrilato parigita inter lia teorio kaj lingvoscio posedata de la parolantoj, kiel ni vidas en Chomsky (1957a), kiu skribas, ke la lingva studo de sintaksa modelo estas "racie rekonstrui intuician scion pri tio, kial frazoj statas tiamaniere kiel al ni sciataj intuicie" (p. 290).⁽⁸⁾ Eĉ en 1957, li ankoraŭ ne identigis sian lingvan teorion ekzakte kun tio, kion parolantoj posedas kiel lingvoscion. Li tiam provis unuarange esplori, ĉu eblas "evolui lingvan teorion precize formulitan kaj koncepte plenan, surbaze de la elementaj nocioj plej klaraj" (Chomsky 1955a, 1-3).

Pli ol kelkaj jaroj estis necesaj, por ke li alprenu mensismon pri sia teorio. En 1959, li faris unu paŝon antaŭen, asertante, ekzemple, ke gramatiko, kiu listigas frazojn tiamaniere, ke ĉiu frazo povu ricevi signifoplenan strukturan priskribon, "karakterizas abstrakte la kapablon posedatan de individuo, kiu estas mastrinta la lingvon" (Chomsky 1959, p. 56), t.e. la kapablon distingi frazojn disde nefrazoj, la kapablon kompreni novajn frazojn, la kapablon rimarki iajn ambiguecojn ktp. Montri tiujn ĉi kapablojn ebligas "la gramatiko kiun ĉiu individuo internigis iamaniere kaj iaforme" (Chomsky 1959, p. 56). Kaj fine en 1965, la identigo de la lingva teorio kun la lingvoscio plenumiĝis, tiel ke "ĉiu parolanto de lingvo estas mastrinta kaj interniginta

generan gramatikon, kiu esprimas lian lingvoscion" (Chomsky 1965, p. 8). En tiu ĉi maniero, plenumiĝis realista starpunkto en la senco de aŭtentika mensismo.

Kontraste al tio, fizika realismo bezonis multe pli da jaroj por eniri en la Ĉomskan vidpunkton. Estas prave, ke eĉ en la fruaj jaroj Ĉomsko iugrade kaj neclare konsciis, ke lia teorio havus eblecon koncerni ion fizikan. Tion ĉi oni trovas en liaj frazesprimoj kiel, ekzemple "por klarigi la kapablon lerni lingvon, ni devas atribui al la organismo (t.e. homoj) iom kompleksan strukturon 'enkorpigitan'" (Chomsky, 1958, p. 433, krampoj aldonitaj).⁽⁹⁾ Tamen tiaj frazesprimoj, ni devas ne forgesi, neniom sugestas, ke iuj aŭ aliaj aspektoj de lia teorio posedas fizikajn korelativojn. Enkorpigita estis anstataŭe "kapabloj por ellabori informon kompleksan" (Chomsky 1958, p. 433) aŭ "sistemo por informo-ellaborado (hipotezo-konstruado)" (Chomsky 1959, p. 58).

En 1980, Ĉomsko eldiris iom pli precizigante, ke "universala gramatiko kaj la konstanta stato de gramatiko (angle *steady state*) estas realaj. Ni atendas, ke ili estas *fizike* reprezentataj, respektive, en la genetika kodo kaj la cerbo de plenkreskuloj" (Chomsky 1980, pp. 82-83, krampoj kaj emfazo aldonitaj).⁽¹⁰⁾ Pli ol deko da jaroj tamen nepris antaŭ ol ekaperas realista starpunkto en la aŭtentika senco, kiel ni supre menciis (ekz. Chomsky 1983, 1987). Chomsky (1987) do asertas, ke "la sistemo (de reguloj kaj principoj iuspecaj) estas reala objekto en la fizika mondo" (p. 37, krampoj aldonitaj).

Sekve ni devas diri, ke realista starpunkto intencita en LSLT estis ne mensista realismo en plene specifita formo, des malpli fizika realismo. Pli specife, lia realista starpunkto estis nur mensisma duonprecizigita en la senco, ke la lingva intuicio estu la celo explorenda pere de la lingva teorio plejble formaligita kaj abstrakta.

Konkludo

En LSLT ne ekzistis la realista starpunkto aŭ mensa aŭ fizika, se ni interpretas, ke Ĉomsko per la koncepto realista intencis ian korelativon aŭ mensan aŭ fizikan. Validus lia insisto almenaŭ pri mensa realismo, se ni interpretas la koncepton pli malsevere, malsevere en la senco ke li priskribis per sia ĝenerala kaj abstrakta teorio de lingva strukturo la lingvan intuicion posedatan de parolantoj. La intuicio tie ĉi intencita, tamen, ne estis ekvivalento de la specifaj aspektoj de la lingva teorio mem. Lia celo tiutempa estis direktita ne al esplorado de la lingva intuicio mem sed plejparte al "konstruado de lingva teorio

precize formulita kaj koncepte plena" (Chomsky 1955a, *Introduction-3*). Ni sekve devas konkludi, ke, kvankam en LSLT la realista starpunkto estis implicita, tio ĉi tamen estis nur en la senco de kvazaŭa mensa realismo.

Notoj

(1) Ĉomsko mem alprenis la saman terminon, biolingvistiko, precipe rilatigante ties implicon al genetika donitaĵo de la lingvokapablo (vd. Chomsky 2004, 2005, 2007).

(2) Malgraŭ tio, la nuna stato de la genera gramatiko tute ne estas simila al natura scienco aparte pro tio, ke mankas al ĝi fizikaj substancoj korelativaj al ties specifaj teorioj. Vd. *Postal en Huck & Goldsmith* (1995, pp. 135-136) pri la sama vidpunkto kaj *Seuren* (2004) pri rilataj diskutoj multe pli detalaj kaj kritikemaj.

(3) La originala frazo estas: "In LSLT, the 'realist' position is taken for granted" (Chomsky 1975, p. 37).

(4) Ekzistas du versioj de LSLT. Unu estas la versio publikigita manuskriptoforme en 1955, kaj la alia la versio publikigita libroforme en 1975. Diversspecaj revizioj estas faritaj sur la lasta versio. En la antaŭparolo al la 1975-a versio Ĉomsko faris la aserton pri la realista starpunkto jam ekzistinta en la 1955-a versio.

(5) *Tomalin* (2006), tamen, indikas, ke malgraŭ la Ĉomska intenco lia celo kongruas kun la vidpunkto, ke "la strukturo de lingva teorio estas ellaborebla en la logika maniero" (p. 176).

(6) Kvankam tiuj ĉi citaĵoj estas eltiritaj el la artikolaro publikigita en 1962, la kongreso tamen estis okazigita en 1958. Tial la citaĵoj devas esti komprenataj kiel la vidpunkto, kiun havis Ĉomsko ĉirkaŭ 1958.

(7) Tion ĉi ni indikis jam antaŭ dudeko da jaroj (vd. *Nagata*, 1988).

(8) La ĝuste saman eliron faris Ĉomsko ankaŭ aliloke (vd. Chomsky 1957b, p. 290).

(9) Ŝajnas, ke tiu ĉi vidpunkto igis Chomsky (2004, 2007) eldiri, ke biolingvistiko komencis sin formi antaŭ kvindek jaroj. Tiu ĉi eldiro estus tial ne erariga, almenaŭ se ni komprenas per biolingvistiko, ke Ĉomsko identigis la enkorpigitan lingvokapablon kun io fizike ekzistanta.

(10) Vd. *Nagata* (1997, 2005a, 2005b, 2007) pri fakterminoj prove esperantigitaj el originaj terminoj anglaj.

Referencoj

Anderson S. R. & Lightfoot D. W. (2002). *The language organ: Linguistics as cognitive physiology*. Cambridge: Cambridge University Press.

Baker M. C. (2001). *The atoms of language: The mind's hidden rules of grammar*. New York: Basic Books.

Chomsky N. (1953). Systems of syntactic analysis. *Journal of Symbolic Logic*, 18, 242-256.

Chomsky N. (1955a). *The logical structure of linguistic theory*. Cambridge, MA: MIT Library (Microfilm).

Chomsky N. (1955b). Logical syntax and semantics: Their linguistic relevance. *Language*, 31, 36-45.

Chomsky N. (1957a). *Syntactic structures*. The Hague: Mouton.

Chomsky N. (1957b). Logical structures in language. *American Documentation*, 8, 284-291.

Chomsky N. (1958). Linguistics, logic, psychology, and computers. En *J. W. Car* (Red.), *Computer programming and artificial intelligence: An intensive course* (pp. 429-454). Illinois Arbor: University of Michigan College of Engineering.

Chomsky N. (1959). Verbal behavior (by *B. F. Skinner*). *Language*, 35, 26-58.

Chomsky N. (1962). A transformational approach to syntax. En: *Third Texas Conference on problems of linguistic analysis in English* (pp. 124-186). Texas: University of Texas.

Chomsky N. (1965). *Aspects of the theory of syntax*. Cambridge, MA: MIT Press.

Chomsky N. (1968). *Language and mind*. New York: Harcourt Brace Jovanovich.

Chomsky N. (1975). *The logical structure of linguistic theory*. New York: Plenum.

Chomsky N. (1980). *Rules and representations*. New York: Columbia University Press.

Chomsky N. (1983). Some conceptual shifts in the study of language. En *L. S. Cauman* (Red.), *How many questions? Essays in honor of Sidney Morgenbesser* (pp. 154-169). New York: Hackett Publishing.

Chomsky N. (1987). *Language in a psychological setting*. Sophia Linguistica, 22. Tokyo: Sophia University.

Chomsky N. (2000). *New horizons in the study of language and mind*. Cambridge, UK: Cambridge University Press.

Chomsky N. (2004). Beyond explanatory adequacy. En *A. Belletti* (Red.), *Structure and beyond: The cartography of syntactic structures*, Vol. 3 (pp. 104-131). New York: Oxford University Press.

Chomsky N. (2005). Three factors in language design. *Linguistic Inquiry*, 36, 1-22.

Chomsky N. (2007). Approaching UG from below. En U. Sauerland & Gartner H.-M. (Red.), Interfaces + recursion = languages?: Chomsky's minimalism and the views from syntax-semantics (pp. 1-29). Berlin: Mouton de Gruyter.

Huck G. J. & Goldsmith J. A. (1995). Ideology and linguistic theory: Noam Chomsky and the deep structure debates. London: Routledge.

Itkonen E. (1996). Concerning the generative paradigm. Journal of Pragmatics, 25, 471-501.

Jenkins L. (2000). Biolinguistics: Exploring the biology of language. Cambridge, UK: Cambridge University Press.

Katz J. J. (1981). Language and other abstract ideas. Oxford: Basil Blackwell.

Nagata H. (1988). The relativity of linguistic intuition: The effect of repetition on grammaticality judgments. Journal of Psycholinguistic Research, 17, 1-17.

Nagata H. (1997). Kernvorto-parametro en genera gramatiko: Apliko al eldiroj de infanoj denaske lernantaj Esperanton. Scienca Revuo, 48, 34-43.

Nagata H. (2005a). Deveno de denaskismo pri lingvoakiro de Chomsky. Scienca Revuo, 56, 81-86.

Nagata H. (2005b). Konstanta stato kiel lingvosocio ĉe Chomsky: Ĉu ĝi estas efektive stabila kaj unuforma? Scienca Revuo, 56, 81-86.

Nagata H. (2007). Kunekzisto de formalismo kaj mensismo/realismo en la genera gramatiko de Chomsky: Kaŭzanto de teoriaj debatoj. Scienca Revuo, 58, 99-110.

Nakaya U. (1958). Kagaku no hoho (Metodo de scienco). Tokyo: Iwanami Shoten.

Seuren P. A. M. (2004). Chomsky's minimalism. New York: Oxford University Press.

Steinberg D. D. (1975). Chomsky: From formalism to mentalism and psychological invalidity. Glossa, 9, 218-252.

Steinberg D. D. (1976). Competence, performance and the psychological invalidity of Chomsky's grammar. Synthese, 32, 373-386.

Tomalin M. (2006). Linguistics and the formal sciences: The origins of generative grammar. New York: Cambridge University Press.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Hiroshi NAGATA

Department of Clinical Psychology

Kawasaki University of Medical Welfare

288 Matsushima, Kurashiki 701-0193 / JAPANIO

<hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp>

Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas profesoro pri psiĥologio kaj speciale studas psiĥolingvistikon rilate al lingvosocio kaj ties akirado fare de denaskaj parolantoj.

Ĉu procedi genitiv-radike, kiel procedis Zamenhof?

Josef KAVKA

Zamenhof, elektante vortprovizion de Esperanto, ĉerpis unuavice el la latina lingvo, kies deklinaciado foje prezentas diferencon inter la radikoj nominativa kaj genitiva. Sufiĉu ekzemplo unusola: se el la vorto "lepus" oni deprenas la finaĵon *-us*, restas la nominativa radiko *lep'*. Tamen, la radiko genitiva – post la forigo de la deklinacia finaĵo *-is* – estas *lepor'*. Zamenhof do elektis la radikon *lepor'*, ĉar ĝi estas produktiva: jen la latina adjektivo *leporinus*, la hispana *leporino*, same la itala, kie la substantivo estas *lepre*.

Sian preferon por la radikoj genitivaj Zamenhof (1906) dokumentis en sia "Universala Vortaro". En ĝi eblas trovi 73 ekzemplojn de la radikoj genitivaj. Jen ilia listo kun la ekvivalentoj latinaj:

| n-ro | esp. radiko | lat. nominat. | lat. genit. |
|------|-------------|------------------|-------------------|
| 1 | abat' | <i>abbās</i> | <i>abbātis</i> |
| 2 | akcipitr' | <i>accipiter</i> | <i>accipitris</i> |
| 3 | akrid' | <i>acris</i> | <i>acridis</i> |
| 4 | arbitr' | <i>arbiter</i> | <i>arbitrī</i> |
| 5 | artifik' | <i>artifex</i> | <i>artificis</i> |
| 6 | aspid' | <i>aspis</i> | <i>aspidis</i> |
| 7 | bov' | <i>bōs</i> | <i>bovis</i> |
| 8 | Decembr' | <i>December</i> | <i>Decembris</i> |
| 9 | dent' | <i>dēns</i> | <i>dentis</i> |
| 10 | diligent' | <i>diligēns</i> | <i>diligentis</i> |
| 11 | elefant' | <i>elephāns</i> | <i>elephantis</i> |
| 12 | elokvent' | <i>eloquēns</i> | <i>eloquentis</i> |